

Informilo de Majo 2015

Numero 16, Mayo 2015

Kunveno prilumis nuklean malarmadon

28 aprilo. Teni viva la memoron pri Hiroŝimo kaj Nagasako estas fundamente grava aspekto de la antaŭenigo de paco kaj internacia kompreno. Jen la mesaĝo kiam Universala Esperanto-Asocio gastigis YAMAOKA Michiko kaj OSIOKA Taeko ĉe Unuiĝintaj Nacioj la 28-an de aprilo. En kunveno en la kunsido de la Fakoj pri Neregistaraj Organizaĵoj de la Departamento de UN pri Publika Informado, sinjorino Yamaoka, oficiale nomita "Memortenanto" de la urbo Hiroŝimo kaj mem filino de transvivanto de la bombado de Hiroŝimo, rakontis pri "La Terura Vero pri Hiroŝimo" al grupo de gastoj invititaj de la oficejo de UEA.

En sia enkonduko, sinjorino Yamaoka rimarkis: "Mi estas Memortenanto. Tio signifas, ke mi rakontas al la juna generacio la historion de la atombombaj viktimoj. Mi rakontos pri mia patrino, kiu estas travivanto de la atoma bombo. Bedaŭrinde la fratino de mia patrino mortis pro la bombado. Tiutempe mia patrino estis 20-jara kaj ŝia fratino havis 13 jarojn. Nun mia patrino estas en hospitalo; jam de kvin jaroj ŝi ne kapablas paroli, promeni aŭ sin nutri sen tubo. Ŝi nun havas 90 jarojn. La transvivantoj de la atomaj bomboj ne rekte kulpigas usonanojn. Ili komprenas la rolon de Japanio en la milito kaj la konsekvencojn de tiu partopreno. Kion la transvivantoj malamas estas la milito mem. Aŭdante pri ilia rektaj spertoj vi eble kondukigos al la sama konkludo."

La du vizitantoj troviĝis en Novjorko kiel NRO-representantoj kunlige kun malfermo de la Kontrolkonferenco de la Partioj al la Traktato pri la Ne-disvastiĝo de Nukleaj Armitoj, kiu nun okazas ĉe la UN-sidejo en Novjorko. Osioka Taeko estas aktiva esperantisto kaj subtenanto de virinaj rajtoj.

Universala Esperanto-Asocio subtenas la ideon de rajto al paco kaj konsideras la homajn rajtojn fundamentaj al sia laboro por antaŭenigi internacian komunikadon kaj interkomprenon.

La simpozio de UEA kaj CED oni dediĉos al la memoro de Joshua Fishman

April 30. La baldaŭ okazonta Simpozio pri Lingvo kaj Ekskludo, organizita de UEA, CED, kaj la Studgrupo pri Lingvoj ĉe UN, estos dediĉita al la memoro de profesoro Joshua Fishman, la eminenta sociologo de lingvoj vaste rigardata kiel plej elstara figuro en sociolingvistiko kaj lingvopolitiko, kiu mortis la 1-an de marto. Li naskiĝis en Filadelfio en 1926 kaj diplomiĝis ĉe la Universitato de Pensilvanio kaj la Universitato Columbia. Dum multaj jaroj li instruis ĉe Jeŝiva Universitato en Novjorko. Tra la jaroj li aperigis abundajn ŝlosilajn studojn pri lingvo kaj socio, inter ili Yiddish in America (La jida en Ameriko, 1965), Language Loyalty in the United States (Lingva lojaleco en Usono, 1966), Language Problems of Developing Nations (Lingvaj problemoj de evoluantaj nacioj, 1968), Sociolinguistics (Sociolingvistiko, 1970), Language and Nationalism (Lingvo kaj naciismo, 1973), Reversing Language Shift (Inversigante lingvoŝoviĝon, 1991) kaj Can Threatened Languages be Saved? (Ĉu eblas savi lingvojn en danĝero? 2001). Kvankam li ne verkis specife pri Esperanto, liaj neformalaj komentoj pri la lingvo estis favoraj kaj subtenaj. Li estis redaktoro de la revuo de CED Language Problems and Language Planning (Lingvaj problemoj kaj lingvoplanado). Li fondis la unfluegan International Journal on the Sociology of Language (Internacia revuo de la sociologio de lingvoj) en 1973, kaj ankaŭ redaktis la monumentan 250-voluman libroserion Contributions to the Sociology of Language (Kontribuoj al la Sociologio de Lingvoj).

En sia nekrologo en Linguist List, la konata fakulo pri dulingvismo, Ofelia García, skribis: "Dum li plenumis imponan amason da esploroj, kaj respondis al multaj konsilpetantoj, Fishman vaste vojaĝis, subtenante tiujn kiuj celis konservi lingvojn en danĝero. Memoros lin la maorioj de Novzelando, la katalunoj kaj eŭskoj de Hispanio, la navahoj kaj aliaj indiĝenaj amerikanoj, la parolantoj de la keĉua kaj ajmara en Sudameriko kaj multaj aliaj lingvominoritatoj, pro lia varmece kaj kuraĝigado." Profesoro García prezentos memorigajn rimarkojn ĉe la Simpozio.

La ĉefparolanto en la simpozio estos Fernand de Varennes, Eksterordinara Profesoro ĉe la Universitato de Pretorio (Sud-Afriko) kaj Gastprofesoro ĉe la Universitato de Honkongo. Kiel internacia jura specialisto pri homaj rajtoj kaj la rajtoj de minoritatoj kaj indiĝenaj popoloj, Fernand de Varennes plurfoje aperis antaŭ komitatoj de UN en Ĝenevo kaj de la Eŭropa Parlamento en Bruselo. Li ankaŭ kunlaboris kun la Alta Komisionestro de OSCE pri Naciaj Minoritatoj kaj aŭtoris plurajn dokumentojn de UN (lingvaj rajtoj de indiĝenaj popoloj kaj minoritatoj; prevento de etnaj konfliktoj; politika partopreno de minoritatoj) kaj Unesko (rajtoj de migrantoj). Li kunlaboris en dialoga seminario de juĝistoj de la Afrika Kortumo de Homaj kaj Popolaj Rajtoj. Nunmomente li pretigas praktikan manlibron pri lingvaj rajtoj por la Oficejo de la Alta Komisionestro de UN pri Homaj Rajtoj.

Inter la referaĵoj prezentotaj en la simpozio, pluraj rilatos al la lingvopolitiko de UN kaj pluraj al lingvoj kaj packonservado. La 11 referantoj apartenos al sep landoj: Islando, Britio, Hungario, Francio, Kazahio, Ĉinio kaj Usono. Profesoro Esther Schor, el la Universitato Princeton, prezentos malfermajn rimarkojn.

La Simpozio okazos jaŭdon la 7-an de majo ĉe 777 UN Plaza, Novjorko, ekde la 9-a horo. Detaloj pri la simpozio troviĝas ĉe www.languageandtheun.org.

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041

www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041